



# NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO  
DE LA  
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responde eldonanto :

Lucien BOURGOIS,  
21, Rue Gambetta,  
NOYELLES-GODAULT (P.-de-C.).  
Ĉiun presigotan materialon  
oni sendu al la ĉisupra adreso.

Kotizoj (kun bulteno)

- a) Junuloj : 2 Fr.  
b) Aktiva membreco : 3 Fr.  
c) Subtenanto : 5 Fr.  
pagendaj al C.C.P. LILLE 517-15  
Fédération Espérantiste du Nord,  
17, Rue des Bouvreuils, ARRAS (P.-de-C.).

---

Ĝenerala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, CALAIS (P.-de-C.).

---

Informilo n° 1

Januaro-Februaro 1964

Omaĝo al Prezidento KENNEDY.

Komenciĝis nova jaro. Ĉu ĝi alportos al ni feliĉon k pacon? Tion ĉi ni sincere esperas. Tamen, ni akre sentas la foreston de Iu, batalinta por la plenumo de niaj komunaj aspiroj.

En fora hejmo, la kutima ĝojo radianta en tiu ĉi unua tago de l' jaro subite estingiĝis k ĉiuj partoprenas en la doloro de tiu usona familio.

La 22-an de Novembro 1963, konsternite, la mondo eksciis pri la murdo de Prezidento John Fitzgerald KENNEDY. El ĉiuj horizontoj leviĝis protestreagoj; ĉiuj homoj indaj je tiu nomo esprimis sian indignon kontraŭ tia abomena krimo.

La juna k impeta ŝtatestro sukcesis altiri al si ĉies simpatian en la packampo. En krizaj momentoj, li sukcesis eviti mondkonflikton malgraŭ diversaj premoj. Mem viktimo de la dua mondmilito, li koncentris sian tutan energion por plifirmigo de la paca kunekzistado inter la popoloj de la du malsamaj sociordoj. Ankaŭ, en sia propra lando, li klopodis por starigi la egalecon de rajtoj, ebligante al la nigruloj aliron en la ŝtatuniversitatojn. Tiele, li celis repacigi siajn samlandanojn disigitajn pro la hontinda rasa diferencigo, faro de frakcio el la usona opiniantaro.

Punkto post punkto, Prezidento KENNEDY aplikis la programon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Lia morto signis la malaperon de elstara ŝtatestro, inda je sia fama antaŭulo Abraham LINCOLN.

Forlasis nin la homo, sed postvivas lia verko.

Al la homoj de bona volo, inter ili al ni, esperantistoj, apartenas fruktigi la heredaĵon, kiun li postlasis.

Lucien BOURGOIS.

Tria MARKOLA KONGRESO - Calais (Kalezo) : 28-29-30 Marto 64.

Estimataj Gefederacianoj,

La Federacia Estraro petas siajn membrojn multnombre apogi per sia ĉeesto la kuraĝan iniciaton de niaj kalezaj amikoj.

La provizora programo de tiu manifestacio, kiun ni volas impona, estas legebla sur la kunsendita cirkulero.

Grava : Por ebligi glatan organizadon, senprokraste sendu vian aliĝilon al S-ro Ditacroute. Antaŭdankon!

Kalendaro de la Esperanto-Kongresoj 1964 (Sekvo)

- Ĉe Pasko : 3-a Trilanda Konfederacia Kongreso en Kalezo.  
" : Nacia Kongreso de SAT-Amikaro en Rennes.
- 3-an de Majo : Federacia Renkontiĝo en la kadro de la Lille-Foiro.  
9-15 Majo : Fervojista Kongreso en Bruselo k Antverpeno.  
15-18 Majo : Nacia Kongreso de la Belga Ligo en Parizo,  
16-18 Majo (Pentekoste) : 56-a Nacia Kongreso de UFE en Parizo,  
sub Prezido de Prof. Waringhien,  
en la kadro de la Pariza-Foiro.  
Ejo : La Foira Kongres-Palaco. Unutaga partopreno ebla.  
En la programo - Sabate : Suspenzfilmo "Angoroj" en Esperanto.  
Varieta vespero kun la fama humoristo Raymond Schwartz.  
Dimanĉe : Vizito de la Pariza Foiro k ties Esperanto-budo.  
Lunde : Ekskursoj al Grosbois k Orly.  
Kongreskotizo : 10 Fr. La monon oni sendu al :  
Crédit Industriel et Commercial, CCP PARIS N°4.  
Indiku sur la skribotan parton de la kupono :  
56-e Congrès National d'Espéranto, compte : Centrale 27.320.  
Por pliaj sciigoj, turnu vin al : UFE, 34, Rue de Chabrol, PARIS (10°).
- 25-31 Julio : Internacia Kongreso de SAT en Narbonne.  
(SAT, 67, Avenue Gambetta, PARIS-20°).
- 1-8 Aŭgusto : 49-a Universala Kongreso de Esperanto en Hago (Nederlando).

-----  
NIA VIVO.

Hazebrouck (Nord).- La federacianoj estas invitataj ĉeesti la rektmedodan provlecionon, kiun prezentos Cseh- instruisto, S-ro Sipke STUIT, en "Collège Mixte", je la 14-a horo, sabate, 1-an de februaro.

Oni anoncu sin al : S-ro Jean LENEL, 26, Rue Donckèle, HAZEBROUCK.

Wattrelos (Nord).- Dum la jarfinaj festoj, S-ro Lucien GILOTEAUX vizitis esperantistojn en BONN k DUREN.

NIŜIUMI : Ni havas la plezuron sciigi, ke nia konata japana amiko, Prof. Taro NIŜIUMI, fariĝis ĉefdelegito de UEA en TOKIO.

Sendu gratulvorton al : Taro Niŝiumi, 6-443 Koiwa  
Edogawa-ku, TOKIO (Japanujo).

Partoprenontoj de la Universala Kongreso en Tokio estas petataj sin anonci al li.

Tra la gazetaro.

"Le Courier" (Unuesco) N° 11 - novembro 1963 (1)

De sub la plumo de la elstara usona lingvisto Mario PEI aperis artikolo titolita "Serĉado pri universala lingvo". Ĝi citas la ĉefajn projektojn k venas al la konkludo, ke nur neŭtrala artefarita lingvo povos solvi la problemon.

S-ro Mario PEI asertas :

"Historio instruas, ke la kulturoj disfloras el lingvoj, kiuj origine estis rudimentaj, krudaj interkomunikiloj, ekskluzive materiaj.

Se universala kulturo same disfloros el universala lingvo, oni ja povos ĝoji pri tio. Kio ajn estu, per la multaj originalaj verkoj, en prozo aŭ versoj, kiujn ĝi ebligis produkti, Esperanto pravas, ke artefarita lingvo tute kapablas, tuj post ties ekuzo, krei siajn proprajn kulturajn trezorojn" ... Jenaj du karakterizaĵoj de la artefaritaj lingvoj, nome : la fonetikigo k normigo eble pli gravas, ol la "neŭtraleco", kiu neniel povus montriĝi perfekta.

Ni opinias tiujn ĉi karakterizaĵojn sufiĉe gravaj por serioze konsideri la mondiskalan uzadon de artefarita lingvo, samrange kun la multaj naciaj lingvoj, malnovaj aŭ novaj proponataj por tiu celo.

Recenzis : Lucien BOURGOIS.

(1) Havebla kontraŭ 0,75 F ĉe : Librairie Unuesco, Place Fontenoy, PARIS.  
(jarabono : 7 F) - CCP PARIS 12598-48.

Norrent Fontes Sub tiu ĉi rubriko aperis en "L'Espoir", dimanĉe 29/12/63; resumo de artikolo el la revue "Ecole de France dans le Monde" : "Retour de vacances", de Darius Le Corre.

Titolita : "Por la Eŭropa Unuiĝo", ĝi akcentas pri tio, ke ĝis nun la ŝtatoj ne klopodis por solvi la lingvan problemon k tiel ebligi al la popoloj de siaj respektivaj landoj interkompreniĝi kun la aliaj.

S-ro Le Corre alvokas la demokratajn organizaĵojn, ke ili postulu de siaj registaroj meti je sia tagordo la pristudon pri enkonduko de eŭropa artefarita lingvo. Por tio li proponas ĉu Esperanton, ĉu modernan latinaĵon.

Lille - Roubaix - Tourcoing : Tri gazetoj aperigas ĉiusemajne artikolojn pri Espéranto. Krome, la ĉiutaga Junulara Kroniko de "Nord-Eclair" ofte aperigas priesperantajn informojn.

Televideo : La unua elsendo de "Journal de l'Europe" pritraktis la lingvan problemon k la intervjuita angla studentino, krom sian gepatran lingvon, ankaŭ proponis Esperanton - kiu estas verŝajne pli facila - ŝi diris.

#### ESPERANTO EN LA BULGARAJ MEZGRADAJ LERNEJOJ.

Per oficiala letero de la 6-a de marto 1963, la Ministerio de Instruado anoncis, ke ĝi eldonos specialan instrukcion pri la organizado de Esperanto-rondoj en ĉiuj mezgradaj ĝeneralklerigaj k teknikaj lernejoj ekde la lernjaro 1963-64. Samtempe, la Centra Komitato de la Junulara Asocio en Bulgario dissendis cirkuleron, per kiu ĝi rekomendis la amasan lernadon de Esperanto en ĉiuj bulgaraj lernejoj.

(El : "Nuntempa Bulgario" - Jaro VII - N° 12).

Korespondi deziras : Gabriel VAD, Pulc u. 9 - SZEGED (Hungario)  
(Esperante k franclingve). Prezidanto de la loka fervojista grupo,  
li intencas partopreni la kongreson IFEF en Bruselo (ĉijare).

NEPRE LEGU!

Federacia biblioteko. - Nuna stoko de prunteblaj libroj aŭ dokumentoj  
(validas nur por tiuj, kiuj pagis sian federacian kotizon 1964).

- Sonbendo kaj akompanantaj diapozitivoj kun ties komentoj (de Lentaigne).
- Disko : la salutoj al la Kongreso de Bologna.
- Disko : la unuaj lecionoj de la kurso de S-ro Ribot : "Ni parolu".
- Kantlibroj kun melodioj k paroloj : "Kantu kune" (el Ĉekoslovakio); Komuna Kantlibro (Britlando); "La Juna Vivo" (Nederlando); "Koncerta Kantaro" (internacia).
- Verkoj de D-ro Lapenna : "Retoriko"; "Aktualaj Problemoj" de "Nuntempa Internacia Vivo"; "La Internacia Lingvo".
- Antologioj : Dana Antologio; Angla Antologio; Ĉina Antologio.
- Libroj en la franca lingvo : "L'Espéranto, cet inconnu".
- Cours Pratique d'Espéranto, partie supérieure.
- "Les Langues Internationales", Collection "Que sais-je?"
- Geografia Revuo (N-roj 1 ĝis 5); Artikoloj pri Budismo k Andersen.
- Broŝuroj : "La Delto-Plano"; "Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj".
- Revuo OOMOTO (pluraj lastatempaj tre interesaj n-roj); Pariza Gvidlibro (SAT).
- Sciencaj Studoj (Kopenhago 1958); Ekzistencialistaj Herooj (kun apuda franca teksto); Totala sun-eklipso de 15-11-61; Memorlibro de Zamenhof (1959).
- Esperantologio; Vivo de Zamenhof (Privat); Zamenhof (Marjorie Boulton).
- Proverbaro; Lingvaj Respondoj; Leteroj de Zamenhof; Ifigenio en Taŭrido;
- La Predikanto; Virino ĉe Landlimo (Boulton); La Floretoj de S-ta Francisko;
- Rakontoj pri Nederlando (Duhamel); Aŭstralio; Danlando.
- Neĝulino k aliaj fabeloj; Miraklaj Aventuroj de S-ro Longkrurulo.
- "La Okcidenta Ĉambro" k "Lerta Virino" (de Ĉina E-Ligo).
- "Legolibro de fabeloj"; "Pinokjo"; "La Eta Princo" (de St-Exupéry - trad. Delaire).
- "La E-Klubo", "Gaja leganto per Esperanto"; Petro; Esprimo de sentoj en E-o.
- Instrumetodo por E-o; Deveno k vivo de la lingvo E-o.
- La senpera verbigo de Adjektivoj; Du malsanoj en Esperanto.
- Sovaĝa Herbaro (Lu Sin); Tio, kion mi kredas (J. Rostand); Ezopa saĝo.
- Arboj de la Arbaro k kampo; Nia lingvo Esperanto (pecoj por deklamo).
- Infanoj k Patrinoj; Amuzo per Scienco; Mi serĉis oleon k trovis oron...
- Ferio kun la Morto; Kiel aranĝi kursojn k grup-vesperojn. Per kio ni amuzu nin.

GRAVA AFERO POR NIA FEDERACIO : LA KOTIZOJ!

Nun estas tempo (se vi ankoraŭ ne faris) por sendi al la federacia kasisto vian kotizon por 1964. Krome, se ĉitiu numero de "Norda Gazeto" estas ĉisube signita per ruĝa kruco, tio signifas, ke vi NE pagis vian kotizon 1963. Se tiel estas, vi montros vian daŭran interesiĝon pri nia regiona Movado, tuj sendante vian (modestan sed absolute necesan) kontribuadon al la federaciaj elspezoj.

Laŭplaĉe, vi povas utiligi : aŭ poŝtmandaton, aŭ ĝirĉekon, aŭ simple alsendi poŝtmarkojn.

Noto de la kasisto : "Kiam oni ĝiras monon al nia pĉk LILLE 517-15, oni tiel kontaktas min senpere k ne S-ron Odent, spite al la titolo de la konto, kiu estas la sidejo de la Federacio, sed ne tiu de la kasisto.

Sekve, kiam oni deziras interrilati kun la Prezidanto, oni skribu rekte al li k ne uzu por tio la dorsflankon de la ĝirilo, ĉar tio devigus min transdoni la novadon perletere.

Mi alvokas ĉiujn, kiuj povas partopreni la nacian k internacian movadojn (U.F.E. - U.E.A.) sendi al mi siajn kotizojn, kiujn mi ĉiumonate sumigas k sendas al Parizo. Bv. detale indiki la celon de ĉiu pago.

Denove mi alvokas ĉiujn por rapida pago de la kotizoj, ĉar kelkaj pagas tiel malfrue en la jaro, ke ili preterlasas unu jarkotizon, kaŭzante malprofiton al la fed. kaso. Dankon al tiuj niaj membroj, kiuj, komprenante niajn zorgojn k problemojn, pagas la subtenan kotizon. Varmajn bondezirojn de via kasisto : J. DOYELLE.

Nia felietono : Karotharulo - Trad. Jean LENEL.

### LA KARABENO

Sinjoro Lepik diras al siajfiloj :

----- Sufiĉas unu karabeno por vi ambaŭ. Fratoj, kiuj amas unu la alian, metas ĉion komune.

----- Jes, Paĉjo, respondas frato Felikso, ni laŭvice reciprokos la karabenon. Kaj eĉ sufiĉos, ke Karotharulo disponigu ĝin al mi de tempo al tempo.

Karotharulo nek aprobas nek malaprobas, li malfidas.

Sinjoro Lepik eltiras la karabenon el la verda ingo kaj demandas :

----- Kiu el ambaŭ, kiel unua ĝin portos? Ŝajne, devas esti la pli maljuna.

Frato Felikso

Mi cedas la honoron al Karotharulo. Li komencu!

S-ro Lepik

Felikso, vi kondutas afable ĉimatene. Ĉi tion mi memoros.

Sinjoro Lepik almetas la karabenon sur la ŝultron de Karotharulo.

S-ro Lepik

Nu! miaj infanoj, amuziĝu sendispute!

Karotharulo

Ĉu ni kunprenu la hundon?

S-ro Lepik

Senutile. Vi faros vin hundo, laŭvice. Cetere, ĉasistoj kiel vi ne vundas : ili mortpafas nete.

Karotharulo kaj frato Felikso foriras. Ilia simpla kostumo estas tiu de la ĉiutago. Ili bedaŭras, ke ili ne havas botojn, sed sinjoro Lepik ofte deklaras al ili, ke ilin malestimas la vera ĉasisto. La pantalono de vera ĉasisto treniĝas sur liaj kalkanumoj. Li neniam ĝin refaldas. Tiel, li marŝas en la ŝlimo, en la plugitaj teroj kaj baldaŭ botoj formiĝas, supreniras le genuojn, solidaj, naturaj, kiujn la servistino laŭordone respektas.

----- Mi pensas, ke vi ne revenos sentrafe, diras frato Felikso.

----- Mi ja esperas, diras Karotharulo.

Li sentas jukon ĉe la ŝultrokavo kaj malemas surmeti tien la kolbon de sia pafilo.

----- Ĉu ne! diras frato Felikso, mi lasas vin porti ĝin ĝis supersatiĝo.

----- Vi estas mia frato, diras Karotharulo.

Kiam paserobando ekflugas, li haltas kaj signas senmovigon al frato Felikso. La bando transflugas de unu heĝo al alia. Kun la dorso ĝibigita, ambaŭ ĉasistoj senbrue alproksimiĝas kvazaŭ la paseroj dormus. La bando staras nebone kaj pepante iras ripozi aliloken. Ambaŭ ĉasistoj rektiĝas; frato Felikso elfetas insultojn. Kvankam lia koro batas, Karotharulo ŝajnas malpli malpacienca. Li tre antaŭtimas la momenton, kiam li devos pruvi sian lertecon.

Se li maltrafos! Ĉiu prokrasto senŝarĝas lin.

Nu! Ĉi fojon, la paseroj ŝajne atendas lin.

Frato Felikso

Ne pafu! Vi staras tro malproksime.

Karotharulo

Ĉu vi kredas?

Frato Felikso

Memkompreneble! erarige estas, kliniĝi. Oni imagas sin tuj apuda; oni staras ja tre malproksime.

Kaj frato Felikso elembuskiĝas por montri, ke li pravas. Fortimigite, la paseroj reflugas for.

Sed restas unu ĉe la ekstremo de branĉo, kiu fleksiĝas kaj ĝin balancas. Ĝi svingetas la voston, movas la kapon, elmontras sian ventron.

Sekvota.

AL SIA LEGANTARO, "NORDA GAZETO" DEZIRAS PROSPERAN NOVJARON!

Le Gérant responsable : Lucien Bourgois, 21, Rue Gambetta, Noyelles-Godault  
(P.-de-C.).